



# Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2020 (218)

22. 4. 2020

## Koronvirusa pandemio ne haltigis nin



Filmy z pražského klubu esperantistů

4 videa • 36 zhlédnutí • Aktualizováno před 6 dny

Neuvedeno



La koronavirusa pandemio en printempo 2020 forte trafis nian landon kaj ankaŭ nian movadon. Agado de pragaj esperantistoj estas limigita. Ne povas okazi kunvenoj, nek kunaj amasaranĝoj. Ni ĉiuj fermiĝis en niaj hejmoj kaj niaj vizaĝoj kaŝiĝis malantaŭ maskoj. Tamen la esperantista vivo ne haltiĝis. Ni restas en kontakto kaj ni laboras kaj amuziĝas kune. Estiĝis kelkaj gravaj akiroj. Tiu ĉi Bulteno enhavas iujn el ili kaj raportas pri la aliaj.

### EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj .....	2
Novajoj de KAVA-PECH .....	3
Rememore al Stanjo .....	5
Koronvirusa pandemio .....	6
Vidvino en reĝimo de sekretigo .....	9
El korespondaĵo de B. Němcová ...	20
Je jaro / Estas printempo .....	23

### O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980  
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze  
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7  
Vychází třikrát ročně  
Kontakt: [t.brichacek@seznam.cz](mailto:t.brichacek@seznam.cz)  
Redaktor: Tomáš Břicháček  
Korektury: Pavol Petřík

# AKTUALAĴOJ

## Aranĝoj antaŭ la pandemio

**23/01/2020** – rememoriga vespero pri Stanislava Chrdlová okaze de la 20-a datreveno de ŝia forpaso

**06/02/2020** – lingva seminario de Margit Turková

**20/02/2020** – diskuto kun Petr Kotyk el la Muzeo de la nacia literaturo

**29/02/2020** – tradicia renkontiĝo de E-mental' en la praga bestĝardeno

**05/03/2020** – prelego de Jindřich Košťálek pri Brazilo

---

## Akiroj dum la pandemio

★ Oni kune preparis malgrandan vortaron de terminologio rilata al la pandemio – vidu p. 8.

★ Oni kune preparis tradukon de la rakonto *Vdova v režimu utajení* (*Vidvino en reĝimo de sekretigo*) de Roman Cílek – vidu p. 9–19.

★ Jan Šebetovský ciferigis kaj poste lokigis en YouTube kvar silentajn filmojn el la historio de pragaj kaj aliaj ĉeĥaj esperantistoj trovitaj en la klubejo de la praga klubo – vidu paĝon:

<https://www.youtube.com/playlist?list=PLvS7gf4X8ZXZkTkVX-wG1R1H6dlvaPEq4>.

---

## Paska deziro de Max Kašparů

Max Kašparů sendis al ni belan paskan bondeziron:

*Kaj Jesuo venis, kiam la pordoj estis fermitaj, kaj staris en la mezo, kaj diris „Paco al vi.“* Jn 20,26

*Benatan Paskon, nunjare antaŭ la fermita pordo de la preĝejo, deziras al vi Max Kašparů.*

---

## Eldonejo Libera ofertas senpage librojn

Pro la tutmonda krizo Eldonejo Libera el Belgio decidis kune kun siaj aŭtoroj senpage disponigi ĉiujn elektronikajn librojn. Vidu paĝon <http://www.eldonejolibera.be/>.




# Novajoj de la eldonejo KAVA-PECH

Petr Chrdle





Pri du gravaj verkoj eldonitaj en la jaro 2019, nome la verko de Bertha von Suttner *For la batalilojn!* kaj de Petr Chrdle pri la vivo kaj verko de Bertha von Suttner *Sen laco por paco* skribis Jindřich Košťálek en la lasta numero de Bulteno. Lian tekston mi do nun kompletigas nur aldonante la kovrilpaĝojn.

## 2019



Plia eldonaĵo de la jaro 2019 estas jam la tria eldono de la furora


libro de Leif Nordenstorm ĉarme kolore ilustrita de Pavel Rak *Arne, la ĉefido*, kun la subtitolo *Rakonto el la vikinga epoko*. Temas pri aventura historia rakonto el sveda vilaĝo el la jaro 829. La unua eldono de tiu libro gajnis la premion de UEA *Infanlibro de la jaro*. Krom la nuna luksa eldono restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de la dua pli modesta eldono kun molaj kovrilpaĝoj kaj nigroblankaj ilustraĵoj, kompreneble senteble pli favorprezaj.



La lasta eldonaĵo de KAVA-PECH en la jaro 2019 estis *La fido* de Vinko Ošlak, aŭtoro de pli ol 40 libroj, tradukisto kaj predikanto, kiu en tiu sia lasta ampleksa eseo prezentas alian rigardon al la kristana kredo, ol al kiu oni al kutimiĝis.

*Pli da informoj pri la paĝnombroj, prezoj (inkluzive de la rabatitaj prezoj de la libroj en Esperanto por la membroj de ĈEA) kaj pli detalajn priskribojn vi trovos ĉe*


<https://kava-pech.cz>



La unua libro eldonita en ĉi tiu jaro estas esperantigo fare de Zdeněk Pluhař de la origine ĉeĥa verko de Radka Dvořáková *Perrefleksa terapio kiel memhelpo* kun la subtitolo *Kion tuŝi, se io min doloras*. Siajn spertojn la aŭtorino prezentas en la formo de kompreneblaj instrukcioj, kiel oni povas helpi al si mem de pluraj malsanoj kaj doloroj. La teksto estas kompletigita je multaj koloraj klarigaj bildoj.


2020

La ĝis nun lasta verko, eldonita en Esperanto, estas ankaŭ esperantigo de la ĉeĥa originalo, *Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul* de Eva Vychodilová, esperantigita de Petr Chrdle. Ĝi celas infanojn inter kvar kaj naŭ jaroj. Temas pri fabelo, en kiu tri knaboj – amikoj – post aventuraj travivaĵoj ekscias, ke ne ĉiu malbono devas esti malbona, sed iu povas esti eĉ por io bona. Ĉarmaj koloraj ilustraĵoj de Miroslava Zezulová estetike kompletigas la fabelon.



Kaj *Arne, la ĉefido*, kaj *Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul* estas avantaĝaj por komencantoj, ĉar KAVA-PECH eldonis ankaŭ iliajn ĉeĥajn versiojn, do eblas kompari ambaŭ tekstojn.

Mi aldonas ankoraŭ unu ĉeĥan libron, nome la verkon de Vlastimil Novobilský pri sia patro *Jaroslav Novobilský*, kun la subtitolo *Muž, který povýšil morální principy nad strach ze smrti*. Mi prezentas ĝin ĉi tie ne nur pro tio, ke la aŭtoro estas meritplena esperantisto, sed en la libro estas pluraj mencioj pri Esperanto, kaj krome la temo devus plu rezoni precipe inter ni esperantistoj. J. Novobilský estis pedagogo, esperantisto kaj en la milito ĉefo de la loka taĉmento de la nacia liberiga movado, kiu estis kaptita kaj murdita en la koncentrejo Mauthausen.



## Rememore al Stanjo

Petr Chrdle

La 23-an de januaro okazis en la klubejo de Praga Esperanto-Klubo rememorigo al Stanislava Chrdlová, inter esperantistoj konata kiel Stanjo, kiu forpasis pro kancero fine de januaro 2000, do antaŭ 20 jaroj, en la aĝo de 45 jaroj. Mi projekciis du rilatantajn filmojn: La unua montris fragmentojn de ŝia riĉa Esperanto-vivo, la dua la lastan adiaŭon kun ŝi en la ĉefpreĝejo de la Ĉeĥoslovaka husana eklezio sur la Malnovurba placo en Prago. En ambaŭ filmoj ni povis vidi multajn ĉeĥajn kaj eksterlandajn samideanojn, kiuj ankaŭ ne plu estas inter ni. Do ilia rememorigo estis iuspeca flanka efiko de ambaŭ filmoj.

Dum la lasta adiaŭo akompanis Stanjon per kantado Miroslav



Smyčka kaj la funebran paroladon havis Renato Corsetti, tiutempa vicprezidanto de UEA kaj nia proksima amiko. En sia parolado li resumis la ĉefajn meritojn de Stanjo ene de la Esperanto-movado, la Ĉe-metodan instruadon de Esperanto dum mallongaj kursoj ne nur en Ĉeĥio (ekzemple en Lančov), sed ankaŭ eksterlande, ekzemple en San Marino kaj Koreio, prezentadon de moravia folkloro ene de multaj Esperanto-aranĝoj, kompiladon de folkloraj programoj, ekzemple de la tutsemajna oficiala antaŭkongreso en Brno *Moravia folkloro al la mondo* antaŭ la UK en Prago en 1996 kaj de la Nacia vespero en la UK, ŝian brilan ĉiĉeronadon, ofte ankaŭ por esperantistoj, ŝiajn verkojn kaj prelegojn, ktp. Lia parolado estis bona resumo de la agadoj de Stanjo, kiun oni povis vidi antaŭe en la jam menciita filmo.

Fine de tiu konciza teksto pri mia edzino mi petas tiujn, kiuj konis ŝin, dediĉi al ŝi mallongan rememoron en ĉi tiu malgaja ronda jubileo.

# KORONVIRUSA PANDEMIO

## Jak překonat pandemii

Tomáš Břicháček

František Ladislav Rieger před půldruhým stoletím pronesl tato slova: „Ne každý z nás může vykonati skutky nesmrtelné, ne každý může býti velikým myslitelem, anebo básníkem, učitelem národu nebo spisovatelem, neb žurnalistou, vůdcem válečným, anebo státníkem, ale každý může pracovati v oboru svém podle sil svých věrně a poctivě, každý může probouzeti spící a napomínati dřímavé ke skutkům národní povinnosti.“

Tento krásný citát má jistě svoji platnost v každý čas. Vzrušené chvíle, jako je ta nynější, však Riegrovu apelu dodávají na aktuálnosti a poskytují zvláštní příležitost k jeho naplňování.

Mnozí si dnes klademe tradiční otázku „Co dělat?“ – jak být alespoň něco málo užiteční, jak přispět k rychlému návratu do normálu, jak minimalizovat škody a třeba i situaci tu a tam proměnit ve výhru.

Při hledání odpovědi někdy stačí pozorně se dívat kolem sebe. Snažme se o to právě teď a uvidíme spoustu skvělých, obdivuhodných, následováníhodných vzorů chování. Uvidíme také – naštěstí v mnohem menší míře – některé příklady záporné, ubohé, odstrašující.

Všiml jsem si jedněch i druhých a vykryštovala mi z nich následující obecná, zdánlivě banální doporučení – říkejme jim třeba sedmero babských rad –, v nichž vidím klíč k překonání krize.

### **1. Bud'me každý na svém místě**

Zde jsme u Riegrova každý může pracovati v oboru svém podle sil svých věrně a poctivě. Každý ať se snaží dělat dál svoji práci, plnit svoje povinnosti a udržovat společnost v chodu. Nejde jen o práci ve smyslu povolání, kterou teď třeba musíme vykonávat z domova nebo za jinak ztížených podmínek. Jde také o povinnosti rodinné a rodičovské – velkou výzvou je kvalitní vzdělávání dětí doma – nebo úkoly v komunitě (např. udržování chodu spolků, církví, skautských oddílů apod.)

### **2. Chovejme se odpovědně a ohleduplně**

Jednoduše dodržujme současná omezení, doporučení a základní hygienická pravidla, abychom chránili zdraví vlastní i zdraví ostatních a zamezili dalšímu šíření nákazy.

Opět se dostáváme, i když mimoděk, k doktoru Riegrovi. Ten by jistě nebyl potěšen pohledem na pražské sady, které nesou jeho jméno, když jej poslední březnový víkend navzdory karanténě zaplavily davy lidí.

### **3. Nereptejme**

Není vhodná doba na reptání proti autoritám a proti státu. Jak říká prezident Zeman: „Když teče do lodi voda, musí všichni k pumpám.“ V době krize je namístě nechat stranou politické sympatie či antipatie, kverulantství a vlastní ego, a postavit do popředí disciplínu, pokoru a solidaritu. Zkusme chvíli nevnímat státní orgány v politických barvách, ale jako své vedení na kapitánském můstku, které nutně potřebujeme.

Přemýšlejme v této souvislosti o Masarykových slovech: „Demokracie znamená, že každý občan může říct po vzoru francouzského monarchy: ‚Stát jsem já‘. Nebo skromněji: ‚I já jsem stát‘.“

### **4. Pomáhejme si**

Pomáhejme si navzájem, každý podle svých možností a schopností. Někdo šije pro ostatní roušky, někdo nosí starším sousedům nákupy nebo jim zajde s dopisem na poštu, někdo vymýšlí nové ochranné pomůcky. Množina možností, jak být užitečný, je otevřená a záleží na každém, čeho se chopí.

Sluší se snad jen připomenout, že stojí psáno: „*Varujte se konat skutky spravedlnosti před lidmi, jim na odiv ... Když prokazuješ dobrodiní, nechtěj budit pozornost, jako činí pokrytci ..., aby došli slávy u lidí .... Když ty prokazuješ dobrodiní, ať neví tvá levice, co činí pravice, aby tvé dobrodiní zůstalo skryto...*“ (Mt 6,1–4).

### **5. Povzbuzujme se, šířme dobrou náladu**

V nynější tíživé situaci se snažme povzbuzovat druhé na duchu a zlepšovat náladu ve společnosti. Frfňání nad nepohodlím, projevy znuděnosti, nadávání na sociálních sítích nebo rozesílání hromadných mailů s konspiračními teoriemi nás nikam neposunou. Naopak vlídné slovo, úsměv, dobrá zpráva nebo (koronavirový) vtip, mohou zapůsobit jako pravý lék, respektive jako účinný druh nemateriální pomoci.

### **6. Snažme se spojovat, a ne rozdělovat**

Po dobu krize odložme svoje politické dresy a nechme stranou ideové spory i půtky. Jsou chvíle, kdy je třeba se semknout a držet se toho, co nás spojuje. Až vše bude za námi, pak bude čas k opětovnému probuzení demokratického soupeření. A že ožehavých témat bude velmi mnoho – třeba přístup k obnově hospodářství.

## 7. Vytěžme ze situace co nejvíce pozitivního

Snažme se nynější mimořádné podmínky zúročit pozitivně a plodně. Hned se pozastavuji nad tím druhým příslovcem a říkám si s úsměvem, že bude krásné, stoupne-li nám kolem Vánoc a po novém roce porodnost. Ale může jít i o méně ambiciózní počiny. Tak třeba mnozí využijí více času doma na samostudium, na četbu, na posilování, na dlouho odkládané domácí práce, na vyučování dětí věcem, na které dřív nějak nebylo kdy. Je jen na nás, jak tuto jedinečnou příležitost, kdy se život kolem nás zklidnil a zpomalil, uchopíme.

---

## Terminologio rilata al la koronavirusa pandemio

dispneo	dušnost, dýchavičnost
distanca laboro	práce na dálku
enspiratoro <i>aŭ</i> spirilo	respirátor
epidemio	epidemie
febros	horečka
fermo (de lernejoj ktp.)	uzavření (škol atd.)
hejma instruado	domácí výuka
infektiĝo	nakažení (z pohledu pacienta)
infektito	nakažený člověk
kontroli ( <i>ies</i> ) sanstatoj	kontrolovat (něčí) zdravotní stav
koronaviruso ( <i>aŭ</i> kronviruso)	koronavirus
KOVIM-19	COVID-19
krizostabo	krizový štáb
krizostato	nouzový stav
kudri maskojn	šít roušky
kudromaŝino	šicí stroj
kvaranteno	karanténa
malpermeso elhejmiĝi	zákaz vycházení
masko <i>aŭ</i> ŝirma duonmasko	rouška
pandemio	pandemie
protektilo <i>aŭ</i> ŝirmilo	ochranná pomůcka
pruvita ( <i>aŭ</i> konfirmita) kazo	potvrzený případ
resaniĝinto	uzdravený člověk
seka tuso	suchý kašel
simptomo	příznak
spira(ja)j gut(et)oj	kapénky
spirproblemoj	dýchací potíže
viruso	virus

*Připravujeme další rozšíření slovníku.*



## Vidvino en reĝimo de sekretario

Roman Cílek

Ŝi tuŝis lin per sia mano.

Ne necesas plidetaliĝi tion: ni diru, ke iuloke ŝi tuŝis lin.

„Nenio speciala, ĉu?“ li grimacis.

Ŝi altiris lian polmon al siaj mamoj: „Premu min, mi petas. Ek, ne timu... forte, ja ili ne estas el sukero! Do kio? Ili jam ankaŭ ne estas tiaj kiel antaŭe, ĉu? Ĉu vi rememoras, kia mi ĉi tie supre estadis – tiam?“

„Ne, mi ne rememoras.“

„Ne mensogu!“

„Mi ne mensogas. Vidu, eĉ la memoro ne plu servas al mi laŭorde.“

Ili ekridis: unue ŝi, tuj poste aliĝis ankaŭ li, ili ridis, eĉ ridegis, ŝtorme, alflue, plorĝeme, sufokiĝe, larmoj fluis el iliaj okuloj kaj ili dum tiu rido apenaŭ kaptis spiron. „Make love not war,“ ŝi skandis meze de tiu ŝtormo de rido la sloganon de la epoko, en kiu ili vivis sian nefacilan kaj tamen belan junecon. Eĉ nun ili tion same sentis en si: ili volis amori sin kaj ne militi. Ilia rido estis ne nur dankesprimo pro memorigindaj kaj – eĉ per premo de tiama morna epoko – nemalhonorigeblaj momentoj de hieraŭo, sed ankaŭ petpreĝo por iom akcepteblaj morgaŭoj. Tiu rido estis ankaŭ baraĵo kontraŭ vundantaj akraĵoj de nuna tempo. Kaj ne nur tio: la mondo malantaŭ fenestroj kaj pordoj ien malaperis, restis ĉi tie nur ili du, geamantoj de malfruiĝo, du nudaj, jam ne perfekte aspektantaj homoj – kiuj konformus al *kalokagathia*, malnovgreka idealo de harmonio de animo kaj korpo – en atako de neregebla emocio de momenta feliĉo.

„Ĝis ni kapablas tiel mokridi nin mem, ni ja ne estas maljunaj kaj ruinigitaj,“ ŝi diris poste viŝante larmojn de siaj vangoj, makuliĝintaj per okulharkolorigilo.

Li rigardis ŝin kaj kvazaŭ li rifuzus akcepti la realecon.

Magda... tio estas Magda!

Sonĝo, damno, personigita palpado, ĝojo de kuna konatiĝo kaj sufero pro malproksimiĝado, rozoj kaj dornoj de lia jam damne malproksima junaĝo.

Kiel ŝi subite aperis ĉi tie?

Ĉu ŝi falis el ĉielo?

Ĉu malsuprenĵetis ŝin astronautoj el iu plenplena kosmoŝipo?

Tute ne – estis multe pli simpla: ŝi al li nur ordinare kaj eĉ iom oficiece venis.

\* \* \*

„Vi havas ĉi tie neanoncitan viziton, sinjoro kolonelo,“ diris al li antaŭ kelkaj horoj lia sekretariino. „Mi scias, ke vi ne volis esti ĝenata, sed tiu damo diris, ke ŝi venas en pure privata afero.“

Li levis okulojn de siaj paperoj.

„Damo?“ li demandis senatente.

La sekretariinon lia demando iomete malcertigis. „Nu, eble mi malbone esprimiĝis, sed ŝi ŝajnis al mi kiel... kiel...“

„Ŝi eniru do,“ li decidis.

Li mensogus asertante, ke post ŝia eniro en la oficejon, li rekonis ŝin tujrigarde. Devis esti kelke da alrigardoj (dume ŝanĝante okulvitrojn) por transiri de la tutestaĵo al detaloj. Finfine renkonte al tiu bone vestita virino en aĝo, kiu oni povas takte indiki kiel malfrue meza, li preskaŭ nekredeme elspiris:

„Magda...! Ĉu estas vi?“

„Estas mi. Kaj ĉu al vi tio plaĉas aŭ ne, mi trovis vin, Ivan,“ ŝi diris, paŝetis iom pli proksimen al li, donis al li la manon kaj laŭpropone ŝi sidiĝis sur seĝon ĉe konferenca tableto. „Kion alian mi povis fari? Abiturientajn kunvenojn vi ne partoprenadas, sed unu el knabinoj, kiu vivas ĉi tie en Prago, sciigis min, kie kaj kion vi faras. Mi ne ŝatas tiel surprize ataki vin, sed mi certigas vin, ke mi havas por tio gravan kialon.“

„Sed kia atako...“

„Sed jes,“ ŝi interrompis lin, „ĝi estas atako. Kaj eĉ profitema, se mi povas esprimiĝi tiel. Mi simple bezonas vian helpon. Ja vi certe antaŭsentis, ke mi ion volos, kiam mi ĉi tie senatende aperis.“

Li levis la ŝultrojn kaj silentis.

„Ankaŭ tio estas sufiĉe klara esprimo,“ ŝi kapjesis. „Ĉu vi havas por mi momenton, vere nur iometon da tempo?“

„Por vi ĉiam. Ĉu mi povas mendi por vi kafon?“

„Tute ne. Pri kafo, teo, keksoj kaj aliaj ĝentilaĵoj vi fajfu,“ ŝi respondis kun senpereco, en kiu li ŝin eĉ trans murego de kelkaj jardekoj rekonis. „Kaj ne mensogu, ke vi nun ne scias, kiel plenigi vian tempon. La sinjorino apude en sekretariejo klare aludis al mi, kiel tio aspektas kun vi tiurilate. Mi mallongigos do mian parolon al minimumo.“

„Rakontu.“

Ŝi volis rakonti, ŝi komencis, sed ne sukcesis laŭorde fini eĉ la unuan frazon. Eksonis fiksa telefono, unuafoje kaj baldaŭ duafoje, sekvis poŝtelefono. Kaj ankaŭ eniris la sekretariino kaj alportis faksan mesaĝon, je kies enhavo laŭdire necesas tuj reagi, ĉar la alte superranga forsendinto atendas, ke...

„Mi pardonpetas,“ li diris, „ĉi tie mi vere ne povas oferti al vi sufiĉe da kvieto. Kio se ni kunvenus iam frue posttagmeze?“

„Bone. Je kioma horo kaj kie?“ ŝi demandis.

Nu jes, ili renkontiĝis en decaspekta restoracio, manĝis, bone manĝis, eĉ unu glason da vino malgraŭ ŝiaj motoristaj protestoj ili simbole eltrinkis, ili rememoris tion, kio estis kaj kio similis al tuŝoj de imagoj, postsekve sin en materia formo tuŝis ankaŭ iliaj manoj, kaj tuj ankaŭ iliaj kruroj sub la tablo unue nur hazarde, poste jam intence salutis sin. Kaj ĉar tio laŭ naturaj leĝoj simple devis okazi tiel, baldaŭ ili konsciiĝis, ke tio ne povas finiĝi aliloke kaj alimaniere: ili troviĝis en la divorcinta rifuĝejo de Ivan, kiel li nomis ĝin, kie iliaj kruroj jam ne devis tuŝi sin nur kaŝe sub tablotuko kaj tabloplato.

Nu jes, tio devis okazi tiamaniere – kaj okazis.

„Por ne forgesi tion, Magda,“ li rememorigis al ŝi, kiam momentoj de amorado kaj rido jam finiĝis. „Vi ion bezonis de mi.“

Ŝi hezite diris: „Ĉu vi volas aŭdi tion?“

„Certe.“

„Nun?“

„Kial ne?“

„Ĉar tio ne estas ĝuste... nu, do bone. Mi konfesas, ke en via rumorplena oficejo kaj kun tiu persistema sekretariino malantaŭ la dorso mirinde estus por mi pli facile paroli pri tio ol ĉi tie, sed estu tiel. Mi iros rekte al la punkto. En tre strangaj kaj nekompreneblaj cirkonstancoj antaŭ certa tempo perdiĝis mia edzo. Kaj ĉar mi divenas, ke ion similan vi kapablas en via nuntempa posteno, mi ŝatus, se vi helpus al mi trovi lin, aŭ almenaŭ pri li ion ekscii. Kion vi diras?“

Li diris nenion.

Li atendis ion ajn, sed ne ĝuste tion ĉi. Tio, kion ŝi volis de li, estis ege neordinara tasko por viro, kiu apud ŝi post longa tempo, dum kiu la mondo ŝanĝiĝis preter rekono, denove kuŝis nuda.

Ŝi grimacis. „Mi vidas, ke tio forprenis vian spiron,“ ŝi rimarkis rilate al lia silentiĝo.

„Mi ne neas, ke vi surprizis min. Vi ja en tiu restoracio indikis, ke...“

„Ni ne juĝos mian geedziĝon!“ ŝi admonis lin. „Ĉi tiu momento ne ŝajnas al mi taŭga por tio.“

Virina logiko, li ekpensis: por serĉado de perdita edzeto al ŝi tiu momento maltaŭga ne ŝajnis.

„Taŭgeco aŭ maltaŭgeco ne estas tio, kiu konsternis min,“ li kontraŭmetis. „Pli ĝuste dirite mi tion ankoraŭ iom ne komprenas, Magda. Ĉu li tiom mankas al vi?“

„Ne, li ne mankas al mi, tio certe ne,“ ŝi respondis kun subite elŝprucinta akcento. „Se tio eblus, mi neniam plu en mia vivo volus vidi lin – estu ĝi deproksime aŭ defore. Kaj opiniu pri tio el vidpunkto de via profesio kion ajn, mi diros ankoraŭ plu: se oni por murdoj de edzoj deklarus ian prezidentan amnestion, gustoplene mi tiun fihomon, je kiu mi iam

edziniĝis, propramane strangolus kaj poste mi sendus al la Kastelo petleteron.“

Li ekridis. „Bonege! Tio estas tre bela konfeso antaŭ altranga polica oficiro. Ĉu mi rajtas demandi, kial do vi lin serĉas?“

„Pro nia filino.“

„Ĉu al ŝi eble li mankas?“

„Mi ne scias, ŝi estas plenkreska kaj mi ne povas paroli nome de ŝi. Sed mi pensas, ke ankaŭ al ŝi ne.“

„Do kial...?“

„Mi bezonas eltrovi mian edzon ĉefe pro mia pozicio en la familio. Mi timas, ke mia filino kaj eble ankaŭ mia bofilo iam-tiam kaŝe imagas, ke mi eble mortigis lin. Ili ne diros tion al mi rekte, sed...“

„Ho mia dio!“ li interrompis ŝin.

„Ne svenu, mi petas, mi vere ne faris tion. Je mia pionira vorto, se oni tion nuntempe ankoraŭ povas tiel diri. Mi ne faris tion, sed mi ne volas, ke oni tion iam estonte rakontu al miaj genepoj.“

„Genepoj? Vi diris, ke vi havas nur unu lernejo devan nepinon.“

„Kaj kio? Eble ankoraŭ iuj pliaj infanoj pli aŭ malpli frue aperos. La rajton naskigi solinfanon en nia familio batalakiris nur mi mem, kiam mi poste jam kun tiu... kun tiu...“ – ŝi ne trovis taŭgan vorton kaj finis do la frazon en nekompleta formo – „rifuzis kuŝadi.“

Li sopirĝemis kaj proponis: „Kaj ĉu ne leviĝi? Ni vestiĝos, mi kuiras kafon kaj vi diros al mi tion ĉion pli bone aranĝite.“

„Ne,“ ŝi kapneis. „Mi fajfas pri via kafo,“ diris ŝi esence la samon, kion li de ŝi hodiaŭ jam unufoje aŭdis. „Jam estas damne longa tempo, ekde kiam mi tiel nuda kuŝis apud ulo, kiu ne ŝajnus al mi absolute aĉa. Do ebligu al mi la ĝojon kiel eble plej longe. Kaj koncerne nian rakontadon, mi certigas vin, ke same bone mi povas paroli eĉ sen kafo kaj mamzono aŭ kalsono. Ĉu tio ĝenas vin por koncentriĝo?“

„Ne... nun ne plu.“

„Do vi vidas,“ ŝi kapjesis kaj karesis lian ŝultron. „Aŭskultu do. Konkize dirite, la situacio aspektas jene: Mia edzo implikiĝis en la plej supozeble koruptajn intrigojn kaj strangajn, ege strangajn negocajojn kun grundoj kaj domoj, kaj li ankaŭ kuniĝis, kiel okazadas en nia obstina tempo, kun ege strangaj homoj. Kaj kiam apud lia pugo komencis bruli, li proksimume antaŭ unu monato vaporiĝis.“

„Aha.“

„Pardonu. Tiu vortaro, kiun mi uzas, ne estas entute mia – ĝi estas iom transprenita.“

„De kiu?“

„De mia nepino. Sed la esenco de tiu afero restus la sama, eĉ se mi tion tradukus en la poetan lingvaĵon de Vladislav Vanĉura.“

„Bone, transprenitan esprimmanieron de via nepino mi notas, sed se vi vere volas, ke mi pri via edzo ĉu deĵore, ĉu nedeĵore informiĝu, vi devos rakonti al mi iom plu – kaj egale, ĉu per la lingvaĵo de via nepino aŭ per tiu de Vanĉura.“

„Mi ne parolos pri tio plu. Mi skribis al vi pri Kolařík ĉion, kion mi scias kaj...“

„Pri Kolařík?“

Ŝi kovris sian vizaĝon per polmoj. „Dio mia, tio estas honto! Mi pentas, mi profunde pentas! En tiu hodiaŭa antaŭlita galopo mi eĉ ne sukcesis prezenti min. Jam de damne longe, neelteneble longe, mi nomiĝas Kolaříková – kaj li, tiu homo, pri kiu ni parolas, estas Kolařík, Pravoslav Kolařík. Ĉu tio estas klara?“

„Jam jes,“ li kapjesis tirante ŝiajn manojn for de ŝiaj okuloj. „Do vi al mi ion skribis.“

„Mi skribis tion kaj aldonis eĉ memorbastoneton, en kiun mi elŝutis ion el lia hejma komputilo. Kiam ni adiaŭos, mi transdonos tiun laboraĵon al vi. Mi preferis prepari tion tiamaniere, ĉar... nu, mi ne scias, ĉu mi tion kiel ĉasta damo rajtas diri, sed mi antaŭsentis, ke se ni du efektive renkontiĝos, tio estos tiom bela, ke oni ne volos lasi tiujn momentojn malbonigi per io ajn.“

„Do vi tion antaŭsentis...?“

„Jes kaj ne! Kaj se mi ne antaŭsentis tion, mi tute certe volis tion. Ĉiuaspekte, tio estis celatako. Mi scias, ke vi estas divorcita kaj via filo laboras eksterlande. De tempo al tempo mi vidas vin en televido dum iuj viaj oficialaj deklaroj, do ankaŭ pri tio, kiel vi nun aspektas, mi havis certan ideon. Tio dependis do nur de vi, kio okazos. Ĉar ino, kiu ne scipovas anticipe diveni, kun kiu ŝi volos subkovriliĝi, kaj kun kiu ne, estas kiel homa specio nenecesa. Ĉu tion vi ne scias, Ivan?“ Ŝi leviĝis super lin. „Ho, kun kiu vi, sinjoro, interrilatis ekde kiam mi vin antaŭ cent jaroj, tiam ankoraŭ sub la nomo Magda Slavíková, forlasis el mia knabina kontrolo? Mi nun preskaŭ timas forlasi vin denove, por ke vi ne aĉiĝu eĉ pli.“

„Ne forlasu do.“

„Mi ŝatus.“

„Ĉu atendas vin eble iu?“

Ŝi enpensiĝis. „Tio dependas. Koncerne virojn jam sufiĉe longe neniuj. Mi havas nur unu grandan kaj unu malgrandan knabinojn... kaj bofilon. Li estas tolerebla, sed tamen li de tempo al tempo iritas min. Kaj mi havas ankaŭ hundon, viglan hundon, kies misio estas gardi la preskaŭ denove virgan purecon de mia lito. Vi vidas, en malpli granda urbo mi ne povas permesi al mi, kion ekzemple vi ĉi tie – ŝi gestis ĉirkaŭ si – sed tio ne sonis envieme. Pli ĝuste malgaje.“

„Restu do – almenaŭ tiun ĉi nokton.“

„Bedaŭrinde, tio ne eblas. Kaj eĉ mi jam sufiĉe rapidas. Ankoraŭ mi ĝuos lastajn kelkajn sekundojn kaj poste ni faros tion, kion vi proponis al mi antaŭ momento. Ni leviĝos, mi surmetos mamzonon, kiun mia dolĉa nepino nomas jungilaro, vi faros al mi la promesitan kafon...”

„Mi protestas. Konkrete pri mamzono mi laŭ mia scio proponis al vi tute nenion.“

„Vero. Sed plenkura virino scias mem, kie ŝi havas siajn falitajn malfortojn.“

„Do ĉu vi devas...?“

„Jes. Mi prunteprenis aŭton de mia filino. Kaj se mi ĝustatempe ne revenus aŭ per poŝtelefono ne klarigus fidine mian foreston – kio devigus min mensogi –, ŝi pensus, ke mi akcidentis aŭ ke mi vere veturis neniigi spurojn post murdo de mia edzo. Kaj kio estas la plej grava afero inter ĉiuj – hejme atendas min mia nepino. Hela punkto en unukolora grizeco de mia nuntempa vivo.“

Kolonelo Ivan Jeřábek disvingis siajn manojn. „Mi komprenas. Tio estas argumento super argumentoj. Mi supozas, ke la nepino portas ankaŭ vian baptonomon.“

„Ne. Ŝi nomiĝas Veronika... tio laŭdire estas moda. Estu Magda aŭ Veronika, ĉiukaze ŝi estas friponeto.“ Ĉe tiu memoro ŝi ridetis. „Imagu, ke ŝi plej prefere surportas ĉemizon kun tia freneza surskribo. Atendu, kiel tio estas: ‚Mi estas piroteĥnikisto! Se vi vidas min kuri, provu ankaŭ foriĝi ien flanken.‘ aŭ simile. Tio estas iom el via okupkampo, ĉu ne?“

„Nu, ĝuste kun eksplodaĵoj mi ne laboras. Eĉ se – tio dependas...“ li hezitis.

„Sufiĉe jam de tiu parolado,“ ŝi decidis rezolute kaj elŝovis siajn kruojn el sub la kovrilo. „Ni leviĝu, Ivan Jeřábek! Mi ne scias – kaj eble estas ofica sekreto –, kion vi hodiaŭ ankoraŭ havas en programo, sed de mi Veronika atendas babilaĉadon.“

„Babilaĉado – kio estas tio?“

„Tiel la aminda antaŭpubera junulineto nomas tion, kion ni en niaj naive romantikaj tempoj nomadis fabeloj por bona nokto.“

\* \* \*

Post reveno en la oficejon li prizorgis kelkajn tute neprokrasteblajn devojn kaj nur poste li elkovertigis tion, kio estis al li antaŭ unu horo konfidita. Laboraĵo, kiel tiun fasciklon de dokumentoj Magda nomis, havis – ekskluzive aldonajn en memorbastoneto – entute dek unu paĝojn. La kolonelo d-ro Ivan Jeřábek, origine kriminologo preleganta en Polica akademio kaj diversloke, nuntempe ĉefa sistema specialisto en la kampo de prevento, komencis legi kaj baldaŭ li maltrankvile iom moviĝis sur seĝo. Tio vere ne estis agrabla legaĵo. De multaj vidpunktoj, al kiuj pli kaj pli urĝe alvenis unu alia. Kun ĉiu sekvanta paragrafo li nome konsciiĝis, ke faktoj, kiujn Magda Kolaříková, lia iama gimnazia kunsuferantino kaj la

unua el la jam neplatonaj junecaj amoj, diosciaskiel kolektis ne nur pri sia edzo, sed ankaŭ pri liaj tre diversspecaj kunuloj kaj iliaj obskuraj praktikoj, similas al eksploda substanco. Aŭ pli precize al tempumita bombo. Kaj ne eblas do dubi pri tio, ke scio de tiuj ĉi faktoj igas el Magda endanĝerigitan personon. Se iu el tiuj, kiujn tio koncernas, ekscius, ke kun tiu ĉi eksplodaĵo – kvankam ŝi ne estis piroteĥnikistino de la ĉemizo de sia nepino Veronika – rapidis al specialigita polica centrejo, kvankam ne per ofica vojo, sed iel nerekte pere de sia eksa kunlernanto kaj amoranto, kun kiu ŝi antaŭ kelkaj horoj finiĝis...

Sed pri to, kie ŝi hodiaŭ finiĝis, nun ne temis.

Pli ĝuste pri tio, kie ŝi povus finiĝi, se...

Tiom da se-oj!

Li prenis telefonon. „Mi salutas vin, Jaroslav,“ li diris prezentinte sin. „Mi ne ŝatas ĝeni vin, sed mi havas ĉi tie ion, kio eble interesos vin,“ li anoncis al iu, kiun li opiniis por la situacio la ĝustan.

„Sed kion do, kion?!“ miris la alparolito. „Ĉu vi eble intencas dividi kun ni kolegece iun miraklon?“

„Ĉu temas pri miraklo, tion pli bone juĝos vi mem. Mi sendas al vi kurieron kun sigelita koverto. Ĵetinte rigardon sur tion, telefonu al mi.“

\* \* \*

Tiu homo aŭdigis sin jam post kelkdekoj da minutoj.

Kaj sen humuro.

„Ivan, kie vi tion akiris?“

Kion diri? Ĉu malkaŝi la tutan veron? „Nu... tio estas sufiĉe stranga historio,“ li evitis portempe direktan respondon.

Li ne sukcesis. „Aha, stranga historio. Sed vi verŝajne devos rakonti ĝin al mi pli aŭ malpli frue, se vi pri la sorto de tiu homo... – kaj dank’ al kelkaj indicoj ni konjektis, pri kiu temas... – almenaŭ iomete zorgas.“

Li ektusis kaj defore kapjesis: „Nu bone, mi konscias pri tio. Mi rakontos al vi ĉion, Jaroslav – sed nur inter kvar okuloj, ĉar mi ne volas, ke tio iĝu gaja okazaĵo por tuta via departemento. Vi operacaj batalantoj...“

„Lasu tion!“ interrompis lin la viro, kun kiu li parolis. „Evidente, Ivan, vi ne havas eĉ ideon, kion vi kun tiu ino senkonscie movigis. Taŭgus, se vi baldaŭ venos ĉi tien. Ni diru post unu horo. Mi atendas ankoraŭ iun ateston, baldaŭ mi do scios pli kaj ni parolu.“

„Mi faros tion. Kaj ĉu vi vere pensas, ke tiu ino, kiel vi sufiĉe malrespekte nomas ŝin...?“

Li ne lasis lin finparoli. „Mi jam aranĝis tion. Antaŭ momento niaj lokuloj prenis ŝin sub protekton, ĉar ŝia edzo... sed ne, tion mi diros al vi nur persone.“

„Ĉu ŝi scias pri tiu gardado?“

„Ŝi...? Ankoraŭ ne. Sed kaŝe iun protekti, kiel vi mem bone scias baze de viaj spertoj, oni povas nur mallongtempe, poste tian aferon oni devas solvi

profunde kaj kun ĉiuj konsekvencoj. Nu, mi atendas vin, atendas. Mi ne volas ofendi vin, sed ĉi tie ĉe ni tempo sufiĉe rapidas.“

\* \* \*

Papero anstataŭ bonvenigaj panbuleto kaj pinĉaĵo da salo.

„Ĉi tion vi tralegu kaj ĉi tie subskribu ĝin,“ donis al li subkolonelo Jaroslav Rízner paperon kun kelkaj paragrafoj kaj antaŭpresita rubriko por subskribo.

„Sed mi ja...“ provis Jeřábek objeti, sed sensukcese.

„Kara Ivan, ni konas unu la alian jam longe, mi scias, ke vi havas pli altan rangon ol mi, mi scias, kiu vi estas kaj kion vi trairis. Sed ĉi tio estas damne brula operaca afero kun eksterlandaj interferencoj, do eĉ ene de la fako estas submetita al nekutima reĝimo de konfidenco. Kaj mi havas por vi informon, kiu eble surprizos vin, sed ni devas trakti tion tre atenteme. Vi, mi kaj ĉiuj ĉirkaŭe. Vi mem tre bone scias, kiel oni nin en certaj rondoj, ekzemple en gazetoj aŭ inter iuj politikistoj, senlime amas, do ni devas esti singardemaj kaj dum ĉiu paŝo troteti kiel ie en minkampo. Do ne faru obstinojn kaj subskribu tion, mi petas.“

Li subskribis.

En la centrejo de specializigita polica trupo, fokusiĝinta al lukto kontraŭ organizita krimo kun transnacia dimensio, estis kiel ĉiam nerveze viva etoso. Se Magda nur havus ideon... ekpensis Ivan Jeřábek. Kvankam li ĉi tie ne estis la unuan fojon, tiu ĉirkaŭaĵo lin ĉiam per io magia fascinis. Memkompreneble ne ĉio, kio en formo de datumoj de ĉiuj specoj trembrilis el sennombraj komputilaj ekranoj, aŭ en skriba formo eliĝis el diversaj maŝinoj, ne ĉio, pri kio ĉi tie homoj babilis, telefonis, interkonsiliĝis kaj kverelis, povis marĝene koncerni Magda Kolaříková kaj ŝian verŝajne nelaŭdindan edzon, sed la ekscitita konscio aludis al Jeřábek, ke io el tio ja iel-tiel povus rilati al la afero.

„Vi parolis, Jaroslav, pri iuj surprizaj informoj. Do mi senpacience atendas,“ li rememorigis al Rízner, kiu intertempe akceptis kelkajn telefonparolojn.

„Jes, mi tuj dediĉos min al vi,“ diris subkolonelo kaj iris fermi pordon. „Mi ne scias, de kie plej taŭge komenci, Ivan, kaj mi do demandas vin pri io. Ne konsideru tion polica aŭskulto, mi petas.“

„Mi provos,“ li promesis.

„Mi komencos. Demando numero unu: Kio estas por vi sinjorino Magda Kolaříková, kiu tiujn skribajn informojn kaj nemalplenan memorbastoneton provizis?“

Tio komenciĝas bele! ekpensis Jeřábek.

„Ŝi estas,“ li respondis, „iama kunstudentino de gimnazio en la urbo, kie mi naskiĝis, kaj ankaŭ... amikino. Do amikino de junaĝo, se mi povas tion priskribi tiel.“

„Do nuntempe vi regule ne interriltas?“



„Ne.“

„Ĉu ŝi fidas al vi?“

„Espereble jes. Alikaze ŝi ja... ne kontaktus min.“

„Mi komprenas. Ĉu ŝi obeos ĉiun vian konsilon?“

Jeŝábek levis la ŝultrojn. „Mi ne scias, tion mi vere ne scias. Kiel mi divenu tion? Tre longe ni ne vidis unu la alian kaj ŝi estas sufiĉe... memstare pensanta. Ĉiam ŝi estis tia kaj tio verŝajne ne ŝanĝiĝis kun la paso de la tempo.“

„Jes, tion mi el tiuj paperoj komprenis. Ĉu vi havas ideon, kia estis rilato inter ŝi kaj ŝia edzo?“

„Ŝi diris, ke nebona, eble oni povas diri, ke eĉ tre nebona, sed mi ne scias pri tio ion pli kaj kompreneble mi ne demandis pri detaloj. Mi ripetas, ke ni hodiaŭ renkontiĝis post multaj jaroj – fakte jam estas jardekoj – kaj tio estis nur unufoje, do... Damne, Jaroslav, ĉu vi havas pli da similaj demandoj?“

„Permesu, ke mi rememorigu al vi, ke tio estas demandoj havantaj eksteran kuntekston, kaj do precize tiaj, kiaj estas priskribataj en kriminalistaj manlibroj, je kiuj ankaŭ vi mem iam-tiam aŭtore partoprenas,“ rimarkis Rízner. „Sed restu trankvila, portempe mi ne havas pliajn demandojn. Kaj fine ankaŭ mi rakontos ion, kaj temas pri unu el genro de tiuj konfidencaj informoj, pri kiuj ni antaŭ momento parolis. Sinjoro Pravoslav Kolařík estas jam pli ol unu semajnon morta.“

„Morta...?“

„Jes, morta, kaj nome tute kaj komplete morta. Kial vi tiom miras? Ĝuste vi! Ĉu vi tiun ĉi vorton en via vivo ne aŭdis?“

„Ne frenezu! Sed ŝi... ŝi ne scias tion.“

Subkolonelo Rízner kapjesis. „Ŝi ne scias. Kaj en la plej baldaŭa tempo ni eĉ ne volas diri tion al ŝi. Aŭ pli ĝuste, por esti tute preciza, ni ne povas. Mi ne volas ludi cinikulon, Ivan, sed verŝi larmojn pro la sorto de sinjoro Kolařík oni ne devas. Lia edzino per tiuj siaj paperoj kaj memorbastoneto ebligis al ni kompreni kelkajn interligojn kaj progresi denove iom pli en la aferoj, en kiujn Kolařík implikiĝis. Nu... tio sonas taktoplene. Li vere, kiel ŝi indikas, implikiĝis, implikiĝis – kun pli kaj pli senskrupula speco de homoj kaj tiom profunde, ke li poste ne plu hezitis vanigi iun homan vivon. Ili igis likvidi viron, kiu obstaklis ilian celon kaj, kiel okazadas, kunuloj de tiu ulo poste fokusiĝis al Kolařík. Li ektimis, malaperis eksterlanden kun mono, kiu ne komplete apartenis al li, kaj li pensis, ke li kun feliĉo iamaniere eskapos ĉion.“

„Kaj li ne eskapis.“

„Ne eskapis.“

„Ĉu ili trovis lin?“

„Jes.“

„Kie?“

„En Grekio. Proksimume tridek kvin kilometrojn de Tesaloniko. Ili tromplogis lin al kunveno kun viro, kiu estis laŭdire havigonta falsajn legitimilojn por li, kaj ili ekzekutis lin tie sen granda ceremonio per unu sola, precize celita kuglo en la nukon. Nu, li finis do dece; iuj aliaj – kiuj simile riskumis kun homoj, kun kiuj ne estas rekomendinde ludi – ankoraŭ antaŭ morto spertis sufiĉe da sufero. Do sume dirite, Pravoslav Kolařík estas finita. Lia korpo estas – laŭ informo, kiun ni konfidence ricevis – enbetonigita sub planko en iu tiea vinkelo.“

„Kaj ĉu al Magda... lia edzino, oni vere ne povas almenaŭ aludi...?“

„Portempe ne. Ni malkaŝus per tio nian informan fonton, ĉar ni pri tiu okazintaĵo ankoraŭ ne scias. Kvazaŭ ni ne scias. Post certa tempo ni eble al sinjorino Magda Kolaříková kun profunda kliniĝo dankos kaj pardonpetos, sed portempe ni devas meti ĉiujn indulgojn flanken kaj zorgi ĉefe pri to, ke ni en kunlaboro kun eŭropaj sekurecaj trupoj la tutan reton mapigu kaj povu ataki. Kolařík tie estis nur unu el eroj, sed ni aspiras – kiel vi certe komprenas – antaŭ ĉio malkovri la tutan organizaĵon kun ĉiuj ĝiaj branĉoj.“

Jeřábek eknazbruis. „Damne, Jaroslav, foje mi ne envias al vi vian laboron.“

„Same,“ lakone diris Rízner.

\* \* \*

„Ivan, mi legis ie, ke maljunaĝo estas freneziĝo de sentoj,” ŝi trilis en telefono. „Mi ne scias, ĉu tio en plena signifo jam rilatas ankaŭ al nia aĝkategorio, sed... ĉu mi rajtas esti iom malĉasta?“

„Vi rajtas,“ li respondis koncize, ĉar li havis en la oficejo kelkajn serioze mienantajn homojn, kun kiuj li pritraktis pure ĉastajn aferojn.

„Mi venis en Pragon,“ ŝi anoncis. „Mi volas renkontiĝi kun vi, kaj ne nur tion: mi volas amori kun vi. Ĉu vi havas kontraŭ tio ion fundamentan?“

„Pli malpli ne.“

Ŝi ekkomprenis. „Ĉu vi povas momente paroli tiel, kiel vi volus paroli kun mi?“

„Ne, tion mi ne povas.“

„Mi komprenas.“

„Kie vi estas?“ li demandis.

„Mi estas serĉanta lokon por parkumi. Antaŭ momento mi alvenis. Mi havas ĉi tie ankoraŭ dum unu horo aŭ du iun ofican devon, sed poste mi fajfos pri ĉio, aŭton mi lasos ekzemple ie meze de stratkruciĝo, mi sidiĝos sur mureto antaŭ via zorge ŝlosita domo kaj atendos ĝis ankaŭ vin ekregos la sama dezirego. Se nur ĝi ekregos vin.“


„Verŝajne ekregos,“ li diris. „Sed ne, tio ne estas vero – tute certe ĝi superregos min,“ li korektis sin forgesante pri indiferece aspektantaj vizaĝoj antaŭ si kaj lia vido glitis al taglibro sur tablo antaŭ li. Kvazaŭ se li

jam en menso komencus forstreki notojn en linioj por la plej proksimaj horoj.

\* \* \*

Ili amoris.

Bele, senteme, sed tamen iom alie ol pasintfoje. Almenaŭ Ivan Jeřábek tion subkonscie sentis tiel. Escepte de mallongaj momentoj, kiam li en la eklipso de percepto konsciiĝis tute nenion, akompanis lin en tiu belego strangaj kaj fojfoje eĉ iom ĝenaj pensoj. Ekzemple pri tio, ke venos tago, kiam ili du, geamantoj de malfruiĝo, kiel oni povus nomi ilin, ne devos kaŝi sian rilaton kaj havos rajton libere decidi pri sia eventuala estonteco. Aŭ tian penson simple nur nei. Kaj li konsciis ankaŭ, ke en la kuro de la homa vivo ĝis la lasta momento kelkaj aferoj okazadas unike, eĉ la morto ja aperas kiel premiero kaj derniero samtempe: unuafoje kaj lastfoje. Nun ankaŭ fakte temis pri morto. Eĉ se ne pri ilia, kaj eĉ se ne pri morto de homo, pro kiu almenaŭ unu el ili ĉagreniĝus. La situacio estis tia kaj ĝi estis bizara: Ivan Jeřábek majstris pli aŭ malpli bone sian jam nejunan korpon, sed ne kapablis tute bridi siajn pensojn kaj ne scipovis do plene senkateniĝi de la konscio, ke li unuafoje en sia vivo estas amoranta kun vidvino. Kaj eĉ kun vidvino, kiu pri tio, ke ŝi estas vidvino – vidvino iom en reĝimo de sekretigo – mem ankoraŭ ne scias.



*Tradukis Tomáš Břicháček kun vigla helpo de Margit Turková,  
Petr Chrdle kaj Pavol Petrik.*

## El korespondaĵo de Božena Němcová



*La 4-an de februaro 2020 oni festis la 200-an datrevenon de la naskiĝo de la fama ĉeĥa verkistino Božena Němcová. Nek ni forgesas tiun ĉi gravan jubileon. Pro tio ni prezentas fragmenton de unu el ŝiaj privataj leteroj.*

Mia animo estas multfoje kiel lago: facila venteto ondigas ĝin kaj la malkvietaj ondoj ne povas reglatiĝi. Penso penson ĉasas kiel nubetoj dum tempesto, unu pli malgajiga ol alia, ĝis tuta firmamento tegiĝas per pezaj nuboj – el kiuj nek pluvigas nek tondro frapas, en kiuj nur muĝas kaj fulmas, kiujn uragana vento nur ludeme pelas tien-ien, sed ne disigas ilin kaj ne reheligas la ĉielon ... Mi legis foje poemon, kiu al mi tre ekplaĉis. Aŭdu:

### *Ĉe la lago*

*Kiel fantomoj super lago muĝa  
trans rokoj marŝas ar' nebula.  
La ondojn kisas per la lip' sangruĝa  
la suno en kareso lula.*

*Herbej' pendanta super rokokruto  
en vent' dishirtas haron verdan,  
kaj dume kuŝas ĝi en sola muto,  
la akvo rabas floron perdan.*

*Portreto kara en animokerno,  
herbej' taŭzata uragane!  
Kion parolas varme la Interno,  
malvarma mondo aŭdas vane.*

*Ho, forpasinta tempo, ho revenu,  
vi maja nokto de l' iamo! –  
Ho venu, venu, kaj por ni kunprenu  
mortintojn miajn, mian amon! –*

Mi ne konas la aŭtoron. Ĉu ne vere, multaj el ni tiel eksopiras – sed kio forpasis, tio forpasis; ĉu valorus, eĉ se oni redonus al ni la junaĝon, se la feliĉan menson oni al ni rekrei ne povus? Se mi pripensas la jarojn de mia vivo ekde mia dekjara aĝo ĝis nun, mi miras pri mi mem, kaj mi opinias, ke tio eĉ ebla ne estas: tio ne estas vi! Se vi estus min konintaj dum mia aĝo de dekdu-dektri jaroj – pri tiu tempo mi plej prefere rememoras. Mia korpo estis jam ekflorinta – tamen mi estis ankoraŭ duone knabino kaj duone infano – ĝi ne estis plenforma, ronda, mi ankoraŭ ne hontis antaŭ knaboj grimpi sur arbon, aŭ irante el lernejo levi la jupon al genuoj kaj

vadi tra akvo; nek ĝenis min rajde eksidi sur ĉevalon kaj kurpeli ĝin sur herbejo. – Tio estis tempo, kiam min ankoraŭ ĝojigis novaj ŝuoj, vesto aŭ rubandoj kaj mi ne povis ĝispacienci dimanĉon, kiam estis permesate surpreni ilin en preĝejon. Mi ankoraŭ ne hontis, se la patrino en ĉeesto de homoj donis al mi dorsobaton, ĉar mi igis brulkuiro bulborostaĵon, nek opiniis mi kiel gravan aferon, se la patro antaŭ la knaboj – studentoj – diris al mi: Rektigu do la dorson, ne staru tiel ĝibe kaj ne levu ĉiam la nazon supren, vi stulta Gredl! – tio estis lia preferata insulto. – Tiam ankoraŭ, se viroj haltadis dirante: Diable, bela knabino ŝi estas, ne restis al mi la vortoj en la kapo. – Ridi, danci – ĉu sur draŝejo, ĉu en ĉambro de geservistoj, ĉu sur herbejo – ĉio estis egala, nur se mi povis danci. – Gaja mi estis, petolema, mi sur arbojn grimpi, sur ĉevaloj rajdi, kun knaboj interbatiĝi kaj ĉasludi – tio estis mia plej granda ĝojo. Sed mi estis obstina, mi malvolonte cedis. La patrino – severa kaj vortŝpara al ni geinfanoj – ĉiam al mi ĉion abrupte ordonis kaj pro ĉio tuj punis, kaj mi estis devigata ŝin ĉiam pentofare pardonpeti kaj danki. Tio estis por mi io terura kaj mi neniam faris tion, eĉ se ŝi estus min ĝismortige batinta. Multfoje min la sento instigis al tio, tamen la piedo ne moviĝis deloke kaj la buŝo ne malfermiĝis. La patro povis igi min fari, kion li volis, li konis min, kaj ĉiam afable parolis al mi, kaj mi estus por li eĉ en fajron saltinta, se li min alrigardis per sia bela blua okulo kaj diris: Iru, Beta mia, kaj faru tion aŭ tion-ĉi. – Eĉ la puno de li ne doloris min tiel – kaj mi meritis ja ĝin, escepte unu fojon: pro tiu kiso! – Tiam mi ankoraŭ varmkore ankaŭ preĝadis! – Kvazaŭ starus nun antaŭ mi tiu ĉambro kun multo da bildoj kaj bildetoj. – Kaj unu bildo: Kristo kaj Samaritanino – tiu tre plaĉis al mi – mi okulojn eĉ ne forturnis dumpreĝe, kaj mi tiel longe rigardis al ĝi, ĝis tio ne plu estis nura bildo! – Antaŭ miaj okuloj li staris en korpo, al li mi preĝis, lin mi petis pri ĉio, kion mi iam bezonis. La patro laŭdis min, ke mi estas pia, li metis min kiel modelon al la aliaj, kiuj dum preĝo vespere kutimis dormi kaj tage oscedis kaj interpuŝadis sin. Ili ne vidis antaŭ si vivantan portreton de Kristo. – Tiam mi legis plej ŝate Historion pri Genova, tiam mi multe revis pri sorĉumitaj princinoj, pri faroj nekredablaj, kaj mia plej preferata fantaziaĵo estis – foriri en monaĥinejon, kaj nur pro tio, ke mi aŭdadis, ke la monaĥinoj multon lernas samkiel studentoj, kaj tio estus por mi la plej granda ĝojo.

Tiutempe – mi ne havis ankoraŭ aĝon de dektri jaroj, mi venis al Chvátkovice, – urbeto malproksime de mia hejmo, eble unu horon da marŝo –. Mi vivis en familio de bienadministristo por lerni ĉe instruistino kudri kaj ĉe instruisto pianon kaj germanan lingvon. En kia ĉirkaŭaĵo, inter kiaj homoj mi vivis ĝis tiu tempo, tion vi povas plejparte legi en la libro Avineto – krom kelkaj personoj pliaj. – En Chvátkovice mi venis en alian medion – tie komencis miaj unuaj romanoj, naivaj, kiuj al mi ĉiuj restis en la memoro, sed neniu en la koro.

Sed mi komencis paroladon, kvazau mi estus ano de Akademio kaj havus taskon skribi mian biografion, ne ekpensante, ke mi vin per tiaj infanecaj rememoraĵoj enuigas. Pardonu, sed tia estas jam la afero ĉe mi, ke rememoro pri mia junaĝo, kvankam ĝiaj okazaĵoj estis nur bagatelaj, ĉiam min varme kortuŝas kaj ke mi volonte parolas pri ĝi. Postkiam mi mortos, vi povas skribi mian biografion – mi po-momente ĉion diros kaj skribos al vi, mi ja ne havas kialon ion prisilenti: nek la sopirojn de la knabinkoro, nek kiel mi lernis la belon koni, nenion – nepre nenion. Sed unufoje mi ne povas ĉion priskribi, ĝi tedus vin, ĉar mi volonte komencas paroli detalojn kaj ĝojas pro infanecaj bagatelaĵoj, kiuj la leganton ne povas interesi, eĉ se li estus amiko ... Se mi iam malsupreniras en Valhalon de mia koro, mi volonte haltas antaŭ bildoj de mia knabinaĝo – tio estis ja la plej bela tempo – mi ne perdis mian idealon; edziniĝante mi neniun amis, mi priploris nur mian liberon – mi plendis, ke por ĉiam estas detruitaj belaj revoj kaj idealoj de mia vivo. – Mi serĉis mian propran idealon, mi opiniis, ke en la amo al viro mi trovos kontentigon de ĉiuj miaj sopiroj, kompletigon de mi mem ... Multa lumo ekfajreris al mi sur vojo de la vivo, mi kredis, ke tio estas brilo de stelo, sed estis ĉiam nur vaglumeto, kiu estus min erargvidinta en marĉon. Vi, frato, trovus en la Valhalo portretojn kronitajn per rozoj, hedero kaj edelvejso kaj ornamitajn per perloj, ankaŭ kadrojn sen bildo. Kelkfoje estis ankaŭ sur tiuj portretoj – mi opiniis – homoj idealaj, sed mi devis malgaje rekoni, ke temis nur pri aĉa fuŝverko! – La koloroj paliĝis, restis malpura papero – kaj tiun mi elĵetis... Sed la kadro restis al mi por rememoro, ke ne ĉio estas oro, kio briletas. – Mi spertis dum mia vivo multajn dolorojn, amarajn pritrompojn, mi staris ĉe abismo de malespero – tamen malgraŭ ĉio mi ne perdis fidon kaj amon al homoj! Ofte mi kompreneble sentas min malfeliĉa, superflua sur mondo, tiel ke mi kun sobra menso forirus el la mondo, tamen tiuj tempoj ree forpasas – sed tiaj bataloj multfoje rabe forportas pecon da vivo! – Vi skribas al mi, ke mi povas havi plezuron en laboro por miaj infanoj – nu, vi pravas. Mi amas miajn infanojn kaj volonte laboras por ili kaj laboros, dum mi kapablos. Tamen, se ili ne ekzistus – ĉio estus alia! Sed kion vi skribas, ke mi prave povas esti fiera pro tio, ke la nacio min estimas, kaj ke oni min respektas – vere, tion vi mem ne kredis skribante ĝin – kaj mi nur priridetas tion ... Honesta koro, sincera peno estiĝi ĉiam pli perfekta, utili al nacio laŭ ĉiuj miaj fortoj – jen estas la unusola afero, kiu min altigas super la ordinarajn virinojn, kiuj vivas por nenio en la mondo.

*Tiun ĉi leteron, kiu estis skribita iam antaŭ la jaro 1854, tradukis Tomáš Pumpr. La teksto estas transprenita el la Ĉeĥa kaj slovaka antologio, Unua parto (red. O. Ginz, S. Kamarýt 1935)*

## Je jaro Estas printempo

Věra Ludíková

Je jaro, den ode dne vonnější a delší. Na trnové háčky, za vrbová poutka zavěs plátno do prostoru, kolíčky ho připevni aspoň kousek nad zemí. Na něm uvidíš, že na poušti vyrostly palmové ratolesti, v zelených údolích pramení čistá voda. Jako se události stanou v pravou chvíli, právě tak se v pravý čas objevil muž, jenž se znovu obětuje a v nás znovuzrozuje. Tvář vystouplá z duhového pláště stoupá v bílém rouchu výš. Jeho učení navrácí střípkům rozbitého člověka ušlechtilou lidskou duši, jež není spoutána zemskou tíží. Na kosmické vřeteno se navíjí duchovní nit, ze které jsou utkávány duchovní bytosti, nejdříve jenom tušící, potom prostoupené bodem omega, cílem našeho směřování. Ještě je slabá stříbrná nit, také se přetrhává. Zatím vždy neodpouštíme a příklad veliké lásky nebývá úplně následován. Máme však naději, držitelé velikého poselství, že jsouc Bohem stále milováni, předáme lásku jako pochodeň dál.

Estas printempo, tago post tago pli aroma kaj pli longa. Sur dornaj hoketoj, per salikaj maŝoj pendigu tolan ekranon en la spacon, per pinĉiloj ĝin fiksi almenaŭ iom super la tero. Sur ĝi vi vidos, ke sur la dezerto elkreskis palmaj branĉoj, en verdaj valoj fontas klara akvo. Kiel eventoj okazas en ĝusta momento, same tiel en ĝusta tempo aperis viro, kiu denove reoferas sin kaj en ni renaskiĝas. La vizaĝo elstarinta el iriza mantelo ascendas en blanka togo supren. Lia instruo redonas al splitaĵoj de frakasita homo la noblan homan animon, kiun ne katenas la gravito. Sur kosman fadenon volviĝas spirita fadeno, el kiu estas teksataj spiritaj estaĵoj, unue nur intuiciantaj, poste trapenetritaj per la punkto omega, la celo de nia strebado. Ankoraŭ feblas la arĝenta fadeno, ankaŭ eĉ ŝiriĝas. Ankoraŭ ni ne ĉiam pardonas kaj la ekzemplo de grandega amo ne estas plene sekvata. Tamen ni tenas esperon, ni posedantoj de granda mesaĝo, ke estante ĉiam de Dio amataj, ni transdonos la amon kiel torĉon plu.

*Esperantigis Miroslav Malovec*



**B U L T E N O**  
**de Esperantista Klubo en Prago**  
Časopis Klubu esperantistů v Praze  
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

**Klub esperantistů v Praze**

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7